

Eventoj

Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
H-1675, Hungario
Telefona kaj telefakso:
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado

junio (2) - '92

SIMBOLIKO DE LA INTERNACIA LINGVO

La internacilingva movado estiĝis en la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento. La koloro de ĝiaj alprenitaj simboloj estis determinitaj de la *kolor-simboliko de la 19a jc.*, en kiu la koloro de la espero estis la verda. Laŭ klarigo, kiun ricevis jam lernantoj de Volapuko: *unu el la koloroj de la volapuka blazono „estas la verda, ĉar ĝi esperas alporti por la homaro la plej grandan benon.”* Ĝiaj partoj estas: „*du reciproke etenditaj manoj; sub la manoj: la terglobo en nubo, . . . kolombo kun folio en sia beko, ĉirkaŭ la kolombo radioj.*” (Gebaur Izor: Világnyelv, volapük. Pécs, 1888. p.57).

Post la kolapso de la volapuk-movado en 1893 la esperantistoj portis plu tiun simbolon, jam dekomence kun troigoj, pri kio atestas la konsilo el tiujara *La Esperantisto*: „*la kovrilko de ĉiu libro de nia literaturo kaj entute ĉio, kio tuŝas nian aferon, havu verdan koloron kaj portu supre stelon.*” Sed komence almenaŭ la stelo estis diverskolora (pro la verda fono). Plej ofte aperis kvinpinta ora stelo, kaj sur papero kiel presajso, kaj kiel aparta insigno.



En 1903 aperis la poemo *Preĝo sub la verda standardo*, sed la standardo tiam ankoraŭ estis nur imagita de la poeto. En 1904 la Bulonja Grupo Esperantista inventis, kiel apliki verdan stelon kun verda fono: en la supra, maldekstra angulo de verda flago en blanka kvadrato estu la verda stelo! Unu jaron poste ankoraŭ la unua internacia kongreso akceptis tiun iniciaton, kaj ekde tiam la flago de la movado estis la verda flago kun verda stelo.

La idistoj decidis, ke *la Ido-flago estu blua, en la mezo kun la Ido-insigno, t.e. sespinta blanka stelo*, kaj ĉirkaŭ ĝi la surskribo: *Lingvo Internaciona Ido*. Pli malfrue la insigno ricevis sian definitivan formon: blanka sespinta stelo kun blua fono, en la stelo la vorto IDO, en blanka rando de la insigno la teksto: *LINGVO INTERNACIONA DI LA DELEGITARO.*

En la jardeko de la bataloj inter idistoj kaj

esperantistoj la „fideleco” al la verda, respektive al la blua flago etis tre grava. En Esperantio funde radikiĝis kulto de la verdaĵoj, ekstreme uzataj, kelkfoje atingante la limon de manio.

Kontraŭ tiu verdisma kulto ekde la dudekaj jaroj forte evoluis tendenco klopodante iel buntigi la simbolon. Plej ofte oni rondigis la insignon, kaj la verda stelo sur blanka, flava, oranĝa aŭ ruĝa fono jam estis multe pli alloga. Oni kombinis la stelon kun aliaj buntaj simboloj, bildoj kaj grafikajoj, kaj aperis miloj da glumarkoj kaj insignoj porokazaj aŭ aliaj. Kolektantoj jam ne povis sekvi tiun buntecon de la „esperantista folkloro”.



Pro la bezonoj de la reklamado rapide evoluis la kolorpsikologiaj esploroj. En la sepdekaj jaroj tiuj esploroj ĉie en la mondo venis al la sama surpriza rezulto: por granda plimulto de la homoj (en ĉiu aĝo kaj ĉiu sekso) la plej simpatiaj, plej allogaj koloroj estas la oranĝa, ruĝa kaj blua. Alia grava regulo, kiun oni starigis por la reklamado, estas koncize: *ĉiu ronda, rondigita aĵo estas pli simpatia, pli alloga, ol io pinta, akra.* (Pri tio vidu en Esperanto: *Manlibro de varbado* de Manfred Günter.) Multaj esperantistoj jam ekde la dudekaj jaroj instinkte agis laŭ tiuj reguloj kaj amase aperis rondaj insignoj, en kiuj la verda stelo estis en blanka aŭ pompe ruĝa fono.

Eĉ sen la aplikita psikologio jam amasiĝis la problemoj ĉirkaŭ la verda flago (ne konsideri la sektemulojn, por kiuj estis tutegale, kiel aspektas la movado „de ekstere”). La verda koloro, la verda flago jam estis pli konataj kiel tiuj *de la profeto, de la islamo*. En la sepdekaj iĝis vaste konataj la ekologiaj movadoj kiel *verduloj*, kvankam nur laŭnome estante verduloj, ja ili jam aplikis la atingojn de la reklampsiĥologio: ili neniam aperis kun verdaj simboloj. La ekologiaj movadoj, *la verduloj de la dudeka jarcento*, ĉiam reklamas sin per simboloj, kiuj estas buntaj kiel la vivo, ekz. per bela papilio.

Rilate la simbolikon de la Internacia Lingvo multaj pli kaj pli sentis la neceson de radikala ŝanĝo, sed ĝis 1986 la movado esence ne povis liberigi de la jam tre ĝenaj tradicioj. Nur en tiu jaro komenciĝis la finperiodo de la „esperantista verdismo” de ĝiaj flagoj, steloj kaj himnoj.

En 1986 Flandra Esperanto-Ligo (FEL) faris la unuan firman paŝon antaŭen por renovi-

gi la bildon pri Esperanto fuŝitan de la spontane estiĝinta, tradicia, tamen diletanta „propagando” de „verduloj”. FEL la unua forlasis la verdan stelon kaj enkondukis la normalan uzon de la simbolo de Esperanto sur ĉiuj informaj materialoj kaj objektoj. Lian ekzemplon sekvis pli kaj pli da landaj kaj fakaj asocioj kaj lokaj kluboj, kaj UEA ekde 1987. **Per la regule aperanta identa grafika bildo** (kun identaj teksto kaj litertipo) la movado atingis minimuman kondiĉon de la efika informado kaj reklamado. Tiu identa grafika bildo ebligas la uzon de ajna koloro, depende de la okazo, de la fono kaj de la fantazio de la grafikistoj, krome ebligas ĝian kombinin kun ajna teksto (ekz. nomo de asocio aŭ aranĝo) kaj ajna lingvo (ekz. la teksto „Esperanto Lingvo Internacia”).

Problemo de la simbolo estis, ke simboliko por la plimulto de la movadanoj ne estas racia, sed emocia afero. Granda estas la forto de la emociaj ligoj al la verdulaj tradicioj. Tiujn oni ne povis trapasi de unu jaro al alia. Sed la *elastecon de la identa grafika bildo* montris, ke ĝi enhavis la solvon ankaŭ por tio. Tiu solvo estas kvazaŭ kompromiso inter la malnovaj, jam ĝenaj tradicioj unuflanke, kaj la moderna, efika simboliko aliflanke. Fakte ĝi ne estis kompromiso, sed nur unu el la multaj facetoj, multaj *eblecoj de la identa grafika bildo*: verdan stelon oni povas meti en la internon de la bildo aŭ en la radikon de la E-formo. (Speciale bonvena estas tiu kombinaĵo en certaj kazoj, kiam oni kvazaŭ aludas aŭ atentigas al pasintaj, historiaj eventoj de la movado.) Ĝuste elektante la kolorojn, per tiu malnova elemento la bildo povas esti pli bunta kaj pli plaĉa. Ja la *identata grafika bildo de esperanto*, kiu estas el reklamscienca vidpunkto ĉiurilate taŭga, estas kombinebla kun iu ajn, kaj povas aperi en iu ajn koloro!



Menciindas, fine, ke la Estraro de UEA jam en 1983 elektis tiun simbolon, sed nur por la jubilea jaro 1987. Sed la kariero de tiu simbolo ne finiĝis, sed male, nur komenciĝis en 1987. Tiu verko de Hilmar Ilton S. Ferreira el Itabuna (Brazilio) aperis en la movado en tiu tempo, kiam la movado jam estis matura por akcepti kaj ekuzi ĝin.

Árpád Rátkai, Hungario

Teorio

La ekstera ideo

La movado foje batalas, ĉu ĝi koncentru siajn fortojn kadre de la zamenhofa interna ideo, ĉu ĝi enpaku ĉiajn strebojn ekstere de idealaj aspektoj. Iuj prioritatas al nura rekta parola informado ĉe najbaroj kaj konatoj; aliaj preferas vivi sian verdan komunumon kalkulante je ĝia natura allogeco. Ekzistas samideanoj, kiuj nur pensas al agnoskiĝo fare de politikaj aŭ sociaj instancoj; ceteraj sin dediĉas al varbokampanjoj laŭ amatoraj kriterioj, kaj sen buĝetaj implico. Tiuj kvar vojoj estas lasitaj al la plaĉo de lokaj grupoj, kiuj ne emas al pragmatika politiko. Ankaŭ estas la multaj izolitoj ne enplektitaj en iun ajn propagandon.

Freŝdata esplorado ĉe la landaj asocioj montris, ke la tuta konata movado kreas ĉiujare malpli ol 30.000 ekler-nantojn, el kiuj eĉ ne 3000 ĝisvivas la unuan jaron ĉe ni, kio ofte nur kompensas konstantajn perdojn pro seninteresiĝo, laciĝo aŭ morto. Oszkár Princz montris en enketo, ke lokaj statistikoj reliefiĝas la saman konkludon: ĉu per tiuj rezultoj esperanto ĝisvivos duan plenan jarcenton?

Mi mem, daŭre, sed pli detale en la lastaj monatoj, transskribis la diversajn organojn de niaj landaj asocioj, kiuj logike, estas la bildoj de la organizita movado.

Leviĝas ses respondotaj demandoj:

1. Ne abundas nacilingvaj bultenoj por la amaskomunikiloj;

Asociaj esperantlingvaj bultenoj nepras por fidelegi la anaron kaj helpi la komencantojn resti en la asocia kadro; sed mi kuraĝas aserti, ke la duonon de la streĉoj oni ŝparu (se oni ne havas pliajn rimedojn) por monataj unupaĝaj cirkuleroj, aŭ trimestraj bultenetoj en la loka lingvo por senlace bombardi la grandajn informkanalojn. La informservo de UEA ĵus anoncis, ke ĝi pretas helpi tiudirekte. Insistu al ĝi, ke ĝi resendu al vi la materialon, kiun ĝi povas kompili el ĉiuj fontoj.

2. Ne aperas la prezentado de lokaj varboprojektoj;

Malmultaj revuoj raportas la protokolojn de naciaj estrarkunvenoj, kiuj montrus, ke krom administris, la gvidantoj ankaŭ komune pripensas, lanĉas, atendas varbokampanjojn. Certe resumoj almenaŭ instigos al partoprenon.

3. Sekve ne vidiĝas iliaj pozitivaj aŭ negativaj rezultoj, kiuj havas intencon por alilokaj gekolegoj;

La manko de raportoj gravas, ĉar ĝi malbligas konstati kaj sukcesojn kaj la fiaskojn. Estas ampleksa interŝanĝo de landaj organoj. Ili diskonigu spertojn, kiujn en aliaj asocioj,

oni povas adapti, depende ĉu la sekvoj estis valoraj aŭ ne. Abundas en diversaj revuoj la aranĝoj, solenoj, prelegoj, kunvenoj... kiuj ĉiam pretekstas al prezento de la internacia lingvo. Sed malofte oni legas pri la preparoj, kaj la efektivaj rezultoj. *Neniam statistikoj!* Komparoj al alies spertoj povus ankaŭ instigi al laborĝemeliĝoj inter samnivelaj asocioj, aŭ al patronhelpo de pli sukcesa al malpli forta.

4. Ne svarmas la servoj proponblaj al novbakitoj;

Diversaj revuoj citas amason da faktoj, kie oni rapide praktiku la lingvon; dezirindus, ke ĉiu asocio havu rapidan sistemon por prezenti tiujn servojn nacilingve ĉar ili estas la argumentoj kiujn ni elmontru, kaj kiujn novbakitoj insiste volos profiti. Niaj elstaraj kolegoj, kiuj oftege disertat inter si, tra la tuta revuaro, havus okazon tie disponigi sian konvinko-kapablon por helpi la redaktorojn!



5. Ekaperas, iom dise, sed sen granda konvinko, la propedaŭtika argumento, ke esperanto faciligas studadon de aliaj lingvoj;

Aktivaj kaj emeritaj instruantoj ege proporcias en nia anaro. Ili havas la moralan devon prepari la materialon, kompili la pruvojn, eĉ estigi la eksperimentojn por ke ĉiuj uzu la argumenton pri la perada

rolo de esperanto por lerni aliajn lingvojn. Ofte tiaj homoj ne emas al varbado, jen do alia egalvalora hobbio! Tiu tasko estas tiom eminenta, kiom la multaj seminarioj, staĝoj, vortardebatoj en kiuj ili plezurat! Ni pensu, ke se unu terloĝanto el 100, kiun oni trudat al la angla lingvo estus proponita trejniĝi per esperanto-lernado, ni jam milobligus nian merkaton da eklerantoj, sekve, de finlernantoj.

6. Preskaŭ nenie estas aludita la ebleco al planita (eventuale pagota) reklamo, kiu povus esti translima; eble kialas ĉi tie la praa timo nomi esperanton varo.

Post cento da jaroj, ĉu estas aŭdace prezenti esperanton per pagota reklamo; la landaj asocioj ne sufiĉe riĉas, sed kial ne ambicii ion tra ilia "tuto", nome UEA, ĉe translimaj komunikiloj... eble kun ia plurlanda mecenate? Komence tio favoros iun mondoparton, kiun fakuloj selektos post merkata esploro. La koncernataj landaj asocioj sin draste preparos zorge respondi al petoj, kaj proponos adaptitajn lernilojn, kaj perfektajn servojn. Ili instigos la novulojn aliĝi al UEA, nura vojo repagi al tiu ĉi la investon por rekomenci aliloke. Nia varo indas je moderneco!

Jean-Louis Texier
27, chemin des Carreaux
F-91590 Cerny, Francio

(ricevita fotokopio de aperinta artikolo, sen indiko de la fonto)

(Unuiĝintaj Nacioj)

UNO ne parolu esperanton!

Bonvolu kompari la grandecojn de la plej granda via-lingvo-al-esperanta vortaro kaj la plej granda via-lingvo-al-ia-grandlingva vortaro. Frapa diferenco, ĉu ne? Simile diferencas PIV (pri kies relative malmultaj terminoj ni akre disputas) kaj la multvolumaj grandlingvaj vortaroj (kies terminojn oni ĝenerale akceptas).

Esperanto estas ege malmulte uzata dumlabore de samfakaj kolegoj. Tial, eventuale elpensitaj fakvortoj (eĉ se interkonsentitaj) restas apenaŭ elprovitaj (ni ne troigu pri AIS kaj similaj). Kontraste, eĉ se ne senprobleme, la uzado de faklingvaĵo en la grandaj lingvoj estas elprovita kaj dum ĉiutaga kunlaborado kaj internacie.

Sekve, laŭ mi la nuna esperanto ne taŭgas kiel politika, fakscienca, ktp. interlingvo. Sed ĉu ni vere volas, ke ĝi fariĝu tiel nuanca kaj precizeca kiel aliaj lingvoj? Esperanta verkisto iam plendis, ke en esperanto por esprimi diversajn "terlevaĵojn" ekzistas nur la vortoj: monto kaj monteto. Sed se, kiel nacilingve, esperanto havus multajn similajn vortojn, la lingvo ne estus tiel simple lernebla.

Plej multaj esperantistoj elturniĝas per (foje mizere) malgranda "babilvortaro". Eblas iom kompensi la mankon de radikoj per lerta kombinado de vortelementoj, sed bedaŭrinde multaj esperantistoj ne estas trejnintaj kreive fari kaj kompreni nerenkontitajn vortumojn. Esperanto tradicie, sukcese kaj tre valore rolis kiel simpla sendiskriminacia interligilo por ordinaruloj — interesa hobbio — restu ĝi tio, kaj ni penu bone uzi ĝin.

Majk SADLER

Ĉu esperantistoj rajtas finance profiti de la Movado?

Multaj neas tion, precipe kies hobbio estas esperanto. Sed se iu volas fari ĝin serioze, altkvalite, tiu post iu grado devas elekti, ĉu profitcelan laboron plu aŭ hobbion?

Amiko mia havas fabele belan bieneton havante tie kelkajn gastoĉambrojn kaj vivas el t.n. vilaĝa turismo, ne tro koste. Ankaŭ ĉiam io riparendas, plukonstruendas. Kaj ankaŭ pro merkataj vendeblecoj la ferioj ĉe li havas certan prezon. Kelkfoje li invitas tien ankaŭ esperantistojn-geamikojn, sed pro amikeco ne volas akcepti de ili monon. La monon li tamen bezonas, kaj tial li ne anoncas tra esperanto kanaloj. Gastojn li ĉiukaze havas sufiĉe. Sed la Movado ne havas lin kiel esperanto-gastejon kaj li ne havas por li ŝatatan medion. Kiu do gajnas? Ŝajne neniu. Ĉu ĉiam nur mono kaj mankantaj laborfortoj estas la kaŭzo de la nuna stato de la Movado? Ĉu ne foje sufiĉus nur ŝanĝi nian pensmanieron? Ne nur lian, sed de ni ĉiuj, kiuj sugestas tiajn sintenajn modelojn.

Interese estas, ke kelkaj jam havas tiom alian, profiteman pensmanieron, ke lernante esperanton tuj volas profiti finance, loĝante aŭ petante ion de aliaj esperantistoj eluzante la ĝentilecon de aliaj.

Sándor Hideg, Hungario

Esperanto aplikata

Naturkuracado

La firmao Medical Service Company okupigas antaŭ ĉio pri naturaj terapioj. La firmao estas membro de Esperantista Naturkuracista Asocio. Ili dungas alte kvalifikitajn specialistojn, ankaŭ eksterlandajn. Al la pacientoj estas ofertataj la jenajn servojn:

- homeopatio, ryodorakuo, tibeta masaĝo, akupunkturo, ŝiatsuo, Yin Shin Do, elektropunkturo, Moxa, Reiki Usui sistemo, Yumeiho (Orienta Speciala Diina Masaĝo de Saionji Masayuki).

Ĉe la firmao estas kursoj pri:

ĉina medicino, Reiki, Yumeiho, ŝiatsuo, kaj estas proponataj ankaŭ servoj de la t.n. tradicia diagnostiko: ultrasonografio, elektrokardiografio, ehokardiografio.

En la firmao esperanto estas uzata, kiel ĉiutaga laborlingvo. Pliaj informoj ĉe:

Str. Rejtana 43/4
PL-35-077 Rzeszów, Polio.

Komerca aplikado

Informo el Mongolio!

La entrepreno ĈANDMANJ estas preta helpi al vi. Ni povos trovi por ĉiuj dezirantoj malmulte koston hotelon, vivĉambrojn, aŭton, interpretiston kaj multon alian. La peranta kaj servo-pago estas negranda, ni povos anticipi interkonsenti. Se vi decidis alveni aŭ transvojaĝi Mongolion skribu tuj. Ĉeestante en Mongolio, vi restos kun neforgeseblaj impresoj!

P.O. K. 21/797, Ulanbatro, Mongolio

Aperis la numero 1/92 de la gazeto

Monda Merkato!

Senpaga anoncgazeto en esperanto en 20 paĝoj kun 92 rubrikoj.

Petu ĝin (kun 1 IRK) de:

Linguistisches Bureau

Alfred Schubert,

Pf. 1539, DW-8120 Weilheim, Germanio

Kiu volas investi monon en magazeno en Moskvo, kiu vendas eksterlandajn varojn (aŭ alimaniere kunlabori kun tiu magazeno)? Por pliaj detaloj kontaktu:

Anatolij Surnakin, ul. Sarikopodsipnikovskaja 32. kv. 19, 109088 Moskvo, Rusio.

Brazila kosmetikistino serĉas profesion kontakton por interŝanĝi spertojn.

Denise Campana A., Caixa Postal 1087, BR-30161 Belo Horizonte MG, Brazilio

Bulgaraj firmaoj volas internacie komerci. Laborlingvo: esperanto.

Sonida-Klr (kompanio kun limigita risko),

Radoslav Paraŝkevoj, j.k. Strelbište bl. 8,

vh. E, BG-1408 Sofio, Bulgario

Telefakso: +359-42-39192

La lastaj tri informoj estas el Monda Merkato 1/92.

Esperanto-Servo por Komercaj Interrilatoj

Estimataj samideanoj,

Per ĉi tio mi petas vian atenton por la sekva problemaro:

Regule ni povas legi pri pli malpli grandaj seniluziigoj de novaj esperantistoj, kiuj entuziasmigitaj dum la kurso, kiun ili sekvis poste malkovras, ke la aplikado de nia lingvo internacia lüniĝas plejofte al uzo dum kongresoj, individua vojaĝado kaj korespondado. Tion, kion oni volonte vidus, nome la uzadon en larĝaj teknikaj, industriaj kaj precipe komercaj rondoj, oni apenaŭ rimarkas. Kaj ni devas konfesi, ke tiu tre dezirinda uzado bedaŭrinde estas nur tre malgranda parto de la internacia uzado de esperanto.

En la pasintaj monatoj mi ofte pensis pri la neceso fari esperanton pli plenkreska en la internacia mondo, precipe kiam ni povas konkludi ke la batalo inter la naciaj lingvoj denove severe ĝis deponas la novaj kaj freŝaj rilatoj inter la okcidentaj kaj orient-eŭropaj landoj. Ni ankaŭ povas konkludi, ke oni provas fortigi la komercajn rilatojn inter tiuj landoj kaj krome precipe kun Ĉinio, Japanio ktp. Ni nun parolas pri landoj, kie la okcidentaj naciaj lingvoj estas malpli bone regataj kaj ankaŭ ne estas akcelataj pro la fakto, vi konsciigas pri tio, ke oni timas ke tiamaniere la okcident-eŭropaj lingvoj fariĝos pli kaj pli gravaj. Aliflanke ankaŭ vi scias ke la batalo inter la okcident-eŭropaj lingvoj mem denove komenciĝis!

Mi pensas ke tiu pligravigo de esperanto povus esti apogata per la fondo de naciaj centroj, kiuj estu, certe en la komenco, servataj de (fru-)pensionitaj aktivaj esperantistoj. La tasko de tiuj centroj devus esti doni servon al ĉiuj entreprenoj, kiuj volas komercon kun la (fora) eksterlando, sed ne scias kiamaniere fari tion, ofte ĉe tio malhelpata de lingvaj malfacilaĵoj. Kompreneble ni povus uzi nian delegitan reton, sed ni bone konsciis ke tiu reto ne estas publike malfermita por neesperantistoj kaj ofte oni tute ne scias pri tio. La centroj pri kiuj mi parolas povos uzi la fakdelegitan reton, sed ie la nacia industrio kaj naciaj komercistoj devas ekscii, ke precipe ili povus utiligi tiun servon, se nur ni verŝus la konstruon en pli allogan jakon.

Supozu, ke ni fondos en tiom eble plej multaj landoj senprofitajn centrojn ekzemple kun la nomo: ESPERANTO-SERVO por KOMERCAJ INTERRILATOJ (E.S.K.I.). Tiuj servoj havu bonajn kontaktojn kun UEA, la naciaj Ĉambroj de komerco, la organizoj de laboronantoj (en Nederlando VNO kaj NCWO), la Ministerio de Ekonomiaj Aferoj, ktp. La tasko estu fari la iniciatajn kontaktojn kun industrioj kaj komercaj entreprenoj en la eksterlando pere de la tieaj Esperanto-Servoj aŭ per loka fakdelegito de UEA, se la Servo (ankoraŭ) ne ekzistas. Se la resp. entreprenoj mem scias esperanton, kompreneble ili mem povas (devas) transpreni la kontakto(j)n.

Ni povus uzi la sekvontan definon: ESKI estas nedependa monda organizo, kiu provas esti reprezentata en ĉiuj landoj de la mondo. Ĝi celas akceli senprofite internaciajn komercajn rilatojn inter industrioj kaj firmaoj tutmondaj. La helpo de ESKI baziĝas sur volontula apogo kontraŭ kostprezo, ne enhavanta salajrojn. La lingvo esperanto estas la ĉefa lingvo uzata. Kondiĉoj estas haveblaj ĉe ĉiuj naciaj oficejoj.

Eble vi volas reagi je kaj komenti ĉi tiun proponon. Kun samideana saluto

T. Kanter, Ten Utlodreef 24,
NL-7921 HP Zuidwolde, Nederlando.

Diakritaj signoj

TEC (Terminologia Esperanto-Centro) konsekvence utiligas la internacian normon ISO 6937/2 pri transigo de multlingvaj datumoj inter IBM-PC-tipaj komputiloj. La multlingva sistema kodo-medio estas realigita per programaro "Multi Alphabet 1" (driviloj de monitoroj EGA/VGA, ankaŭ speciala modulo por "Hercules-grafik-karto", drivilo de klavaro kun speciala implicita, aŭ laŭdeziro setebila, dislokigo de diakritaj kaj diakrititaj literoj de ĉiuj 41 latin-skribaj lingvoj, kiuj uzas kelkdek diversajn super-, mez- kaj subsignojn. Programaro kiu printas la multlingvajn tekstojn nomiĝas "Multi Alphabet 2". Ĝi kapablas printi ĉiujn tekstajn datumarojn, kiujn kapablas viaj tekst-editoroj "printi en datumaron" (en: print to file), do eblas ĉiujn multlingvajn tekstojn printi per tiom da fontaĵoj, kiujn dum tekst-formatigo kapablas produkti viaj teksteditoroj kaj kiujn kapablas printi viaj printiloj. Prezo de la programaro estas 100 DEM. Por membro de TEC estas la rabato de 40 procentoj (ĉar TEC jam grandkvante aĉetis ĝin). Ekzistas komerca kontrakto inter TEC kaj la softvar-farinto "AUZKY-soft" pri ĝia distribuado. Pagado eblas tute same kiel por la publikaĵoj de TEC (vidu "Novaj Terminaroj" en la n-ro 7.). Abonu ĉe:

TEC, Zádusní (Delnického hn.) 3092
CS-272 04 Kladno, Ĉeĥoslovakio.

№6 majo 1992

VERDIRE

EKOLOGIISMA GAZETO EN ESPERANTO



Konferenco de U.N. pri Medio kaj Evoluo:

Endanŝerigita naturvariceco kaj homa malriĉeco, du gravaj defioj en Rio 92

VERDIRE - ekologiisma gazeto en esperanto, aperas trimonate en 20 paĝoj, formato A-4.

Eldonas Flandra Esperanto-Ligo.

Redaktas: Claude Rouget, Radarv. 5, N-9014 Tromso, Norvegio.

Abonkotizo: por transpagipovaj landoj: 15 GLD (UEA-kodo: vrdr-d), por netranspagipovaj landoj: skriba abondeziro al la redakcio.

Esperanta deklamkonkurso

Reciti literaturajn verkojn, deklami versojn - estas bazaj aferoj por senti nin anoj de nia esperanto-kulturo. Tiun celon servas la diversaj literaturaj kaj belartaj konkursoj, kaj tion celis ankaŭ la deklamkonkurso, organizita de la E-grupo en u. Pápa en Hungario kun la gvido de József Németh, la 11-12-an de aprilo. En la aranĝo partoprenis pli ol 100 personoj, kaj konkursis en 4 aĝo-grupoj. Gajnintoj de unuopaj kategorioj:

6-10 j.: Dániel Gardos (Budapest)

10-14 j.: Diana Juhos (Pápa)

14-18 j.: Éva Cszimadia (Szombathely)

18- : Ágnes Dézsi (Zalabér)

Aparte ĝojiga estas la bona kunlaboro de E-instruistoj, kaj la alta kvalito de la prezentoj. Pro la ĉjara sukceso kaj interesiĝo de eksterlando, la sekvajaran konkurson oni planas fari internacia.

Muzika kulturo



Baldaŭ aperos nova sonkasedo

“Por vidi la mondon”

Anna Lászy (aŭ pli konate “Anjo Amika”) ne estas jam tute nekonata por la publiko de esperantlingvaj kanzonoj.

Post la debuto en 1985 ŝi kantis en multaj forumoj de Esperantio, certe multaj memoras pri ŝi el Varsovio, UK, 1987.

Lastatempe ŝia voĉo regule estas aŭdebla en la elsendoj de hungara radio. Fine de marto Anjo kun siaj helpantoj komencis aŭdacan entreprenon:

malhavanta financon subtenanton ŝi komencis la registradon de sonkasedo kun 12 diversstaj kaj stilaj kanzonoj sub la titolo: “Por vidi la mondon”.

La kasedo enhavas ankaŭ plurajn tradukojn de internacie konataj kantoj, kiel “Woman in love” de Barbra Streisand, aŭ “Se mi rozo estus” de János Bródy, ktp.

Registrado en la studioj de Hungara Radio jam finiĝis, do estas preskaŭ certe, ke dum la UK jam estos ankaŭ kasede ĝuebla la voĉo de Anjo. Kontaktadreso:

Anna Lászy

H-1141 Budapest, Öv u. 101. I/2. Hungario.

Movado

(“Mi ne ŝatas nomiĝi esperantisto en mia urbo, ĉar estas jam iu, kaj li volas esti la ĉefo. Mi eble abonus esperanto-revuojn, sed mia loka peranto estas tiel malsimpatia. Io ajn, kio rilatas al li, - ne, dankon.”)

Esperanto-klubo — baza unuo de la esperanto-movado

Laŭ la ĝisnunaj spertoj, izolita persono ordinare ne havas tian forton, potencon kaj influon, kiel organizita movado. Se la esperantistoj agus nur kiel izoluloj, la esperanto-movado verŝajne neniam atingus la celon.

Cetere, la celon ni povas difini diversmaniere, sed ni diru, ke la celo estas esperanto kiel agnoskita kaj aprobita, oficiala helplingvo en la tuta mondo. Tiel estas ĝenerale komprenata la celo de nia agado kaj movado. Kiel do atingi la celon, kiam esperanto ne estas nacia lingvo, ĝi ne estas parolata en iu lando aŭ regiono, kiam mankas al ĝi la hejmo aŭ ni diru patrujo? Jes, esperanto estas viva lingvo kaj tiel ni do devas iel krei al ĝi ian, kvankam ankaŭ artefaritan hejmecon apogon. Kaj la hejmecon apogo de nia lingvo ĝuste estas la esperanto-klubo.

Kial kaj kiel fondi esperanto-klubon?

Laŭ la statuto de SEA (Slovakia Esperanto-Asocio) la bazaj konsistigaj partoj de la Asocio estas la lokaj grupoj. Ili povas nomiĝi klubo, rondeto, societo, aŭ alie. Sed ni prefere kaj intence uzadu la vorton klubo, ĉar ĝi prezentas kaj akcentas multe pli firman organizon, pli hejmecon atmosferon ol la aliaj multsignifaj vortoj. La esperanto-kluboj estas esperanto-hejmoj, kie renkontiĝas la familianoj de esperanto kaj hejmecon etoso de la klubo vivigas la lingvon kaj kreas la veran, malgrandan patrujon de esperanto.

Ĝuste pro la menciitaj kaŭzoj (la temo ne estas nova) oni jam ege multe skribis pri ĝi ekde la komenco de esperanto-movado. Nu, tamen la temo estas konstante aktuala, ja ĉiam estiĝas novaj kluboj, kiuj memkompreneble utiligas por si la riĉan heredaĵon de spertoj el kluba laboro, sed ĉiu klubo tamen alportas ion novan, ion originalan kaj tio estas grava fakto, kiu devigas nin de tempo al tempo denove paroli pri esperanto-klubo kaj devigas nin ankaŭ revivigadi eble jam forgesitajn malnovajn, sed bonajn spertojn kaj samtempe disvastigadi ĉion novan kaj utilan kaj tiel pliriĝigadi la vivon de niaj esperanto-kluboj.

En la lastaj jaroj estis ĉe ni fonditaj pluraj esperanto-kluboj kaj pluraj sendube estas fondotaj. Nu, per la fondo de nova klubo nenio finiĝas, sed male — ĝuste komenciĝas, ĉar ni bezonas ilin por, ke la tuta movado iru antaŭen.

La novaj kluboj nepre bezonas komprenon kaj helpon, ofte eĉ konsilojn. Ili bezonas koni la bonajn spertojn de aliaj kluboj, sed ankaŭ la malbonajn, por ke oni evitu la malsukcesajn agojn. Krom tio, multaj homoj eĉ ne scias, kion signifas la vorto esperanto — estas do ankaŭ la speciala devo de ĉiu esperanto-klubo fari propagandon inter la larĝa publiko por la ideo de la lingvo kaj por la lingvo mem, organizi kur-

sojn kaj “krei” novajn esperantistojn.

Konante la sencojn kaj signifojn de la esperanto-kluboj, neeviteble aperas la demando — kiel fondi esperanto-klubon.

Certe en diversaj lokoj estas diversaj kondiĉoj por funkciado de esperanto-klubo kaj tial la unua tasko estas koni la kondiĉojn kaj esplori eblecojn por daŭra laboro de la klubo.

Ju pli bone ni konas ĉion, des pli bone verŝajne funkcios la estonta klubo, sed ni devas ankaŭ memori, ke nur la kono de la situacio ne povas sufiĉi. Nepre ni devas kontaktigi almenaŭ ok-dek seriozajn kaj respondecajn personojn, kiuj havis aŭ ankoraŭ havas, eventuale povus havi ian favoran aŭ pli personan rilaton al esperanto, kiuj ekzemple estas partoprenantoj de koresponda kurso aŭ izolitaj membroj de Slovaka Esperanto-Asocio, aŭ kiuj havas ian rilaton al lingvoj ĝenerale, kiuj eventuale povus krei la kernon de la estonta klubo. Laŭ mia opinio estas pli bone paroli kun ĉiu aparte kaj eviti demagogiajn, t.n. “organizajn talentojn”, kiu tre rapide ekbrulas, multege promesas, sed nenion faras kaj baldaŭ ĉion forgesas, kaj ofte pro sia lingva malkapablo eĉ kontraŭagas.

Necesas zorga preparo!

En ĉi stato de la preparoj estas utile krei jam tri-kvarmembran preparkomitaton kaj komune daŭrigi, ĉefe bone pripensi la lokan institucion, kiu estus la plej favora por esperanto-klubo.

Certe la elekto kutime ne estas tro granda, sed tamen ekzistas. La preparkomitato serĉos fidindajn informojn pri la plej favoraj kondiĉoj kaj eblecoj kaj pritraktos ĉion, plej bone kun la estro de koncerna institucio. Kiam ĉio estas pripensita kaj pritraktita, la preparkomitato decidus pri dato kaj horo de la fondkunveno, dissendos invitilojn al ĉiuj supozitaj personoj.

Invitu la partnerojn!

La preparkomitato devas ne forgesi sufiĉe frue informi pri la fondkunveno koncernan teritorian konsilantaron de la landa esperanto-asocio kaj eventuale ankaŭ la najbarajn esperanto-klubojn. Plue, estas bone ne forgesi la kompetentajn lokajn funkciulojn — invitu plurajn partopreni la fondkunvenon, certe almenaŭ unu-du alvenos kaj ilia ĉeesto influos la fondkunvenon kiel oficiala aprobo kaj instigo. Oni rekomendas ankaŭ, antaŭ la fondkunveno publikigi koncizan anoncon pri proksima fondo de la esperanto-klubo (kun konkreta dato, loko, kaj horo), en loka aŭ distrikta gazeto. En la anonco nepre uzu la sekvan frazon:

En ĉiu iom grava urbo de nia regiono jam troviĝas esperanto-klubo, kiu ĝis nun mankis en nia urbo, sed jam estas survoje ĝia fondo. Vi povas kredi, ke ĝuste tiu frazo influas tre favore.

La programon de la fondkunveno pretigos la preparkomitato, kiu povas memkompreneble kunlabori kun la teritoria konsilantaro.

La komitato de la nova esperanto-klubo elektita jam dum la fondkunveno pretigos poste la kluban statuton, pritraktos ĝin kun la estraro de koncerna institucio, konfirmos ĝin ambaŭflanke kaj la nova klubo povos eklabori.

Ján Görlich, Ĉeĥoslovakio
(el Esperantisto Slovaka 3/91)

Recenzoj

Werner Bormann:

Entreprenistaj Strategioj.

Priskriboj de la entrepreno. 64 p., formato A-5. Eldonis la aŭtoro, Hamburgo 1991.

Oni povas kalkuli la verkojn pri ekonomiko en esperanto per la fingroj de ambaŭ manoj. La unua merito de tiu ĉi libro estas, ke ĝi riĉigas la internacian lingvon sur faka tereno.

La dua merito konsistas el tio, ke la aŭtoro de "Bona Ŝanco" kapablas prezenti per simplaj konceptoj (tamen ne rapide digesteblaj por neinicito) la strukturon de moderna entrepreno, inkluzive de ĝiaj bazaj elementoj (kapitalo kaj laboro). La verko analizas plue la merkatajn leĝojn por la sukceso de entrepreno: po-

litikon de kostoj kaj prezoj, strategion de marketingo kaj reklamado, k.s. Aparte ekvilibraj estas la sociaj konsideroj, ekzemple en la kampo de dungo kaj maldungo.

Pri ĉiu el la supraj temoj aperas en la mondo amaso da volumoj. La arto de Bormann estas pritrakti ĉion en nuksoŝelo.

Gian Carlo Fighiera
(laŭ Heroldo, n-ro 1859)

Instruistoj! Ĵus reeldoniĝis

Metodiko de la esperanto-instruado

de Rudolf Rakua.

Reformeŭropaj landoj mendu ĉe Hungara ILEI-sekcio, Márta KOVÁCS, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest, Hungario kontraŭ 200 HUF (hungaraj forintoj). Aliaj ĉe UEA kontraŭ 15 NLG (nederlandaj guldenoj).



Duoble jubilea Fiŝa Tago.

Multaj en Esperantio aŭdis jam pri superintensaj 5-tagaj e-kursoj, kies partoprenantoj - kaj lernantoj kaj instruantoj - ŝerce nomas sin 'Fiŝoj'. La ideo naskiĝis antaŭ pli ol dek jaroj. Du eminentaj hungaraj esperantistoj: Jozefo Horváth kaj Péter Rados ellaboris programon por eksperimenta intensa e-kurso. *Tiu kurso pruvis, ke la lingvo ellerneblas bazgrade dum kvin tagoj (entute 52 horoj), post kiuj oni kapablas trapasi la ekzamenon.* Tio okazis precize antaŭ dek jaroj, en aprilo de 1982. Ĝis 1989 okazis 14 kursoj, en kiuj partoprenis pli ol 600 personoj. Dum la kursoj oni aplikis elementojn de diversaj instrumentoj, inter alie de la rekta metodo, de sugestopedio kaj multaj aliaj. *La instruado estas ekstreme intensa kaj efika.* Ĉio baziĝas je profunde psikologiaj principoj. Jen kelkaj, ĉefaj karakterizaj trajtoj de la metodo:

- tre zorgema, serioza, longdaŭra antaŭ-preparo,
- elekto de la partoprenantoj laŭ psikologiaj testoj,
- la kursanoj ricevas esperantlingvajn pseŭdonomojn (tre grava elemento, kiu donas novan personecon al la lernanto),
- ekstreme detale kaj strikte prilaborita instruplano,
- laŭminute prilaboritaj horskizoj,
- plena konscio pri la forpaso de la tempo

(oni montras al la homoj, kiom multe oni povas ellerni eĉ dum unu minuto),

- komuna loĝado,
- granda disciplino,
- amoplana etoso,
- anstataŭ lernolibro oni uzas belajn, kolorajn afiŝojn, kiuj okulfrappe prezentas esperantan gramatikon,
- korusa ripetado de sloganoj, kiuj entuziasmigas la gelernantojn,
- apliko de multaj ekzercoj por koncentriĝi kaj malstreĉiĝi,
- la memorigon de gramatikaĵoj helpas multaj kantoj,
- aktoreca konduto de la geinstruistoj.

Ĉe la fino de la kurso, la partoprenantoj estas iom lacaj sed ravitaj pro multaj, nekutimaj, eksterordinaraj travivaĵoj. Ili plu lernas la lingvon memstare kaj partoprenas en la kunveno de la 'Fiŝklubo', kiu unu aŭ du foje en la jaro aranĝas por ili 'Tutlandan Fiŝtagon'. La 4-an de aprilo okazis la deka, do jubilea renkontiĝo de 'Fiŝoj'. Por inde festi la duoblan datrevenon oni aparte zorgeme preparis la programon. Krom altnivelaj, interesaj prelegoj kaj alloga arta programo (kantoj, skeĉoj, teatraĵoj), kiel neatendita surprizo aperis du grandegaj, bongustegaj, kompreneble fiŝformaj tortoj.

Perlo Miela kaj Esperantina Mirska.

Movada lernejo

Denove pri Pasporta Servo

Pasporta Servo estas servo de la esperantomovado por esperanto-parolantoj. Ĝiaj membroj havas la eblecon ricevi **senpagan tranoktadon**. Ĉiu, kiu posedas propran ekzempleron de la adresaro de la gastigantoj estas membro kaj rajtas uzi sian liston por trovi gastigon. La listo estas persona. **Oni ne rajtas prunti sian liston al alia persono.** Tial ĝi devas havi la nomon de la posedanto sur la kovrilo.

Gastigado pere de Pasporta Servo ne nepre estas luksa. Ĉiuj variantoj ekzistas, de dormado surplanke en propra dormsako ĝis rajto utiligi la tutan domon.

Kiel fariĝi gastiganto?

1. Aĉeti la liston de gastigantoj kaj skribas sian nomon sur la kovrilon. Ĉiujare nova listo estas eldonata; **ĉiu listo validas ĝis la apero de la sekva eldono.**

2. Fariĝi mem gastiganto. Ĉiu, kiu mem aperas en la listo de gastigantoj senpage ricevas ekzempleron de la listo kaj tiel li fariĝas membro. Gastiganto devas ĉiujare rekonfirmi, ke li volas esti plu en la listo.

Pasporta Servo, kio ĝi ne estas?

Venis al landa organizanto de Pasporta Servo peto havigi tranoktejojn por samtempe plurdeko da homoj, neesperantistoj. Ili aŭdis ion pri Pasporta Servo, pri helpemaj homoj kaj senpagaj tranoktebloj. Pasporta Servo ne estas por ili. La gastigantoj estas kutime volontuloj, ĉe kiuj mem eblas tranokti laŭ interkonsento kaj kutime kun antaŭvido esti iom amika al li, tial li faras tiun servon. Li ne estas senanima funkciulo de amasa hotelo. Tio povas doni ankaŭ multajn avantaĝojn, la faman rektan kontakton inter diverslandanoj por kio esperanto estas destinata kaj montras signifan avantaĝon al aliaj lingvoj.

Sur la aliĝilo aperas: "mi ofertas **SEN-PAGAN** gastigon..." kiu povus miskomprenigi iujn, kion tio signifas. Aliloke estas klarigite, ke la senpageco rilatas *nur al tranoktado*, kio kutime ne kromkostas por la gastiganto mem, sed ĉiujn aliajn kostojn (se ekzistos) oni nepre antaŭe interkonsentu por eviti embarasajn miskomprenojn!

Tasko de Landa Organizanto: kiel la gastigantoj, ankaŭ li estas volontulo, helpas, sed *garantii* ne povas gastigon, serĉi gastiganton.

La adresaron de P.S. mendu ĉe via kutima libroservo aŭ ĉe UEA. Krom la mendoj ĉion alian materialon (inkluzive informpetojn kaj (re)aliĝojn) direktu al la centra respondeculo pri P.S.:

Rob KEETLAER,

Postbus 2310, NL-1000 CH Amsterdam,

Nederlando

(Tel: + 31/20/6363740)

**ESPERANTA
SONKASEDO
SEN PAGO!**

**Legu la alvokon
sur la suplementa paĝo!**

Por via notlibro

Landaj organizantoj de Pasporta Servo

Aŭstralio:

- S-ro Max WEARING, 30 Westbury Street, Hackney SA 5069. Tel.: (08) 425 338.

Belgio:

- S-ro Jean Pierre VANDENDAELE, Oostmeers 36, B-8000 Brugge.

Brazilio:

- S-ro Joao Manoel AGUILERA Junior, Caixa Postal 120, CEP-13001 Campinas (SP).

Britio:

- S-ro Geoffrey WOOD, 37 Thornes Moor Close, Wakefield, West Yorkshire, WF2 8QA, Tel.: (0924) 371 207.

Bulgario:

- Marin BACEV, P.K. 1054, BG-1000 Sofia, Tel.: (02) 725 311.

Ĉeĥo-Slovakio:

- Jiri KREUZBERGER, Dolní Zivovice 157, CS-747 56, Tel.: (0653) 93 514

Finnlando:

- Raimo TUISKU, Sävelkuja 2 A 10, SF-04400 Järvenpää, Tel.: (90) 29 17 993.

Francio:

- S-ro Jorgcs COMTE, Route de Lavalanet, Saint-Felix-de-Rieutort, F-09120 Varilhes, Tel.: 6160 8683.

Germanio:

- Germana Esperanto Junularo, Rheinweg 15, DW-5300 Bonn 1, Tel.: (0228) 235 898.

Hispanio:

- Antonio VERDU CASELLES, Mariano Benlliure 84-6a-1, E-03201 Elche, Tel.: (96) 544 9741.

Hungario:

- Sándor HIDEG, Fonal u. 18. H-1184 Budapest.

Israelo:

- Jeremi GISHRON, Esperanta Centro, B. P. 231 80, IL-91 231 Yerushalayim, Tel.: (02) 866 249.

Italio:

- S-ro Dario BESSEGHINI, Via U. Dini 139/a, I-56017 Gello di S. Giuliano, Tel.: (050) 820 326.

Kanado:

- Norrnand FLEURY, 6358 de Bordeaux, Montréal QC, H2G 2R8, Tel.: (514) 495-8442.

Korea Resp.:

- HO Song, p/a Korea Esperanto-Asocio, CPO 4258, Seoul 100-642, Tel.: (02) 734 6222, 886 9114.

Kroatio:

- Kroata Esperantista Unuiĝo, Trg Burze 2, HRV-41000 Zagreb.

Latvio:

- Guntars BRĀLIS, D. Brantkalna iela 7-26, 226082 Riga 82, Tel.: (0132) 581 584.

Nederlando:

- Sander VAN HUIJZEN, Tooropstraat 54, NL-6521 NR Nijmegen, Tel.: (080) 229 256.

Polio:

- Robert ZAREMBA, Skr. poczt. 61, PL-01-922 Warszawa.

Rusio:

- Rusia Esperantista Junulara Organizo (SEJM), -a/ja 111, 143006 Odincovo-6, Moskovskaja obl.

Svedio:

- S-ino Inga JOHANSON, Stampgatan 60 B, 127, 2tr, S-411 01 Göteborg.

Svisio:

- Junularo Esperantista Svislanda, CP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

Turkio:

- Heŝmet kaj Enver YALCIN, Kurtdereli cad. Ebru sok. S-Erses apt N.1 D:4, Üstgöztepe/Istanbul.

Usono:

- Virginia STEWART, 2244 Lillian St. Eugene, OR 97401, Tel.: (503) 683-7336.

Centra Respondeculo:

- Rob KEETLAER, Postbus 2310, NL-1000 CH Amsterdam, Nederlando.

Arangoj

Somera Studsemajno en Finnlando

La Esperanto-Klubo de la urbo kaj la Somera Universitato de Jyväskylä organizas la 25-an studsemajnon de esperanto kun la gvido de Andrzej Pettyn el Polio, kaj Iva Aberg el Svedio inter 28.06. - 03.07.1992.

Studhoroj: kurso por komencantoj (daŭriga kurso) konversacia rondo (temo: Finnlando 75-jara), lingvaj nuancoj.

La instru-horojn kompreneble kompletigas distraj programoj.

Aliĝkotizo: 500 finnaj markoj (ĝi inkluzivas nur la instruadon), pri aliaj kostoj (tranoktoj, manĝoj) ĉiu zorgas mem, sed la partoprenantojn helpas la kluba kontakt-persono en ĉiuj aferoj. Pliaj informoj ĉe:

Seija Kettunen

Keihäsmiehenkatu 3, SF-40630 Jyväskylä, Suomi-Finnlando.



Infana tendaro dum la UK!

Esperantistaj instruistoj de la bazlernejo en Zalabér (ĉ. 50 km-oj de la aŭstria landlimo) organizos esperanto-tendaron por bazlernejanoj inter 26-a de julio ĝis 1-a de aŭgusto.

La tendaron povas partopreni ĉ. 30 infanoj 10-14 jaraj. Estas antaŭvidataj diversaj kursoj, pluraj ekskursoj (ankaŭ 1 taga ekskurso al Vieno!), kaj multaj komunaj ludoj. Partoprenkotizo: 2.200 Ft-oj, kaj ĉ. 800 Ft-oj da programkotiz-kontribuo.

Pliaj informoj ĉe:

*Bazlernejo, Esperanto-fako,
S-ino Dézsi Ágnes,*

H-8798 Zalabér, Hunyadi u. 2. Hungario.

Konkurso

OSIEK-premio

OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj) premias nebeletran verkon en esperanto aŭ esperantigon de nebeletra verko je pli ol 200.000 presignoj. La premiito devas esti ankoraŭ vivanta.

La premio valoras almenaŭ 300 ekuojn aŭ senpagan ĉeestadon de IEK, laŭ elekto de la premiito.

Slovakia Esperanto-Asocio invitas al

Somera Esperanto-Lernejo SEL-92

SEL-92 okazos en du etapoj: 04.07.-17.07. kaj 15.08.-28.08. en Poprad, en la konstruaĵoj de la Asocio.

Instruado okazos ĉiutage antaŭtagmeze po 5 instruhoroj, en la kursoj:

A - kurso por komencantoj.

B - konversacia, paroliga kurso. La kursaĵoj devas koni la fundamentan gramatikon kaj simplan konversacion.

C - kurso por progresintoj (la aliĝinto devas paroli esperante).

D - seminario por lingve spertaj esperantistoj, kiuj aktive regas la lingvon. La prelegoj temas pri literaturo, historio, metodiko de instruado, organizaj aferoj, ktp.

En posttagmezo okazos ekskursoj, naĝado, kaj diversaj kultur-amuzaj programoj. Dum la instru-horoj funkcios infanvartejo por infanoj de 4 ĝis 7 jaroj.

Kotizoj inter 117-195 DEM. Pliaj informoj:

*Slovakia Esperanto-Asocio,
Sobotské nám. 6, CS-058 01 Poprad,
Ĉeĥoslovakio.*



TEJO-KER Seminario

Inter 30.10.92. kaj 04.11.92. okazos en Venetia, apud Torino, TEJO-KER seminario kun la temo: "Kio preter ekonomio: eblaj alternativaj dimensioj en homaj rilatoj."

La seminarion parte subvencias la Eŭropa Junulara Fondaĵo de Eŭropa Komunumo, do la partoprenantoj ricevos repagon de 50% de vojaĝkostoj surbaze de duaklasa trajn-bileto. Ankaŭ la partoprenkotizo estas modesta, ĝi estas inter 100 kaj 140 guldenoj.

Aliĝilon petu ĉe TEJO, aŭ rekte ĉe la organizantoj:

*IEJ, Francesco Amerio,
via Pagliani 5, I-10126 Torino, Italio
Tel.: +39-11-676740
Telefakso: +39-11-3190271*

Ĉiuj membroj de OSIEK rajtas proponi po 2 premiindajn verkojn ĉiujare. La komitato de OSIEK raportas pri ĉiuj proponitaj verkoj en LG kaj pri 5 plej ofte proponitaj verkoj dum la ĝenerala asembleo de OSIEK. Dum ĉi tiu sama ĝenerala asembleo la OSIEK-membroj decidas kiu el la 5 plej ofte proponitaj verkoj indas je OSIEK-premio dum ĉi tiu jaro. Unu verko ne povas ricevi pli ol unu OSIEK-premion. Ĉiu verko povas esti repropozita dum postaj IEK. Pliaj informoj:

*Patricia SARICA, sekretario de OSIEK,
50 rue Haute, F-57210 FEVES, Francio.*

Lingvo

Ĉu "mallong-ondo" aŭ ĉu "kurt-ondo"?

Pri la "mal-vortoj", tio estas pri la vortoj derivataj per la prefikso *mal-*, oni jam ofte diskutis. Kvankam la esprimo de la *malo* aŭ *kontraŭo* per aparta deriva silabo troviĝas plimalpli amplekse ankaŭ en naciaj lingvoj (en la angla kaj la germana ekz. per *un-*), do ne estas io nenatura aŭ artefarita, ĉiam iuj aŭ aliaj esperantistaj aŭtoroj - precipe poetoj - provas anstataŭigi *malvortojn* per novaj radikoj (neologismoj) - *maljuna*-n ekz. per *olda*, *malforta*-n per *febla*, *malmola*-n per *dura* k.t.p.

Ili argumentas, ke la derivaĵoj kun *mal-* ofte estas ne nur pezaj, precipe kiam pluraj el ili dense sinsekvas (ekz. *La maljunulo malrapide mallevis sian malfortan brakon*), sed ankaŭ malpli esprimovaj, precipe kiam ili ne signifas ion negativan (kiel *malbona*), sed pozitivan (kiel *malfalsa*). Speciale ĉe *malmola* Kalocsay moketis, ke ĉi sono ne sugestas ion malmolan, sed, kontraŭe, ion, kio estas eĉ pli mola ol simple nur mola. Aliaj simile kritikis, ke la vorto por *mallongo* estas pli longa ol tiu por *longo*.

Plie kaj prave oni akcentas, ke Zamenhof mem, dank' al sia admirinda sento por lingva praktiko, tute ne realigis ĉiujn teorie eblajn *malvortojn*. Li ne uzis, ekz. *malsur* sed *sub*, ne *maljes* sed *ne*, ne *maltago* sed *nokio*, ne *malkomenco* sed *fino*.

Tamen la konservativa rezisto kontraŭ plimalpli ĝenerala anstataŭigo de la *malvortoj* per novaj radikoj estas komprenebla, speciale el la vidpunkto, ke gravas por esperanto ankoraŭ la avantaĝo de facilnernebleco surbaze de plejble praktika simpleco.

Sed ĉe du *malvortoj*, nome *maldekstra* kaj *mallonga* prezentiĝas pli forta kaj vere praktika motivo por almenaŭ iugrada, subkondiĉa anstataŭigo: en trafiko kaj tekniko bezoniĝas tre klara distingo inter *dekstra* kaj *maldekstra*, *longa* kaj *mallonga* per ankaŭ laŭ sono kontrastaj, mallongaj vortoj. Pravigeblas, eĉ postulas do, ĉiukaze sur tiuj kampoj, la uzo de ekz. *lefta* anstataŭ *maldekstra*, kaj de *kurta* anstataŭ *mallonga*.

Por *kurta* oni povas pledi ankaŭ lojale laŭ la fundamenta regulo 15 pri la *fremdvortoj*. Ĉar en jenaj lingvoj ĝi sonas same aŭ simile, kun sama aŭ simila signifo:

latine: *curtus*; itale kaj hispane: *corto*; france: *court*; svede: *kort*; germane: *kurz*; angle: *curt*, *short*; ĉeĥe: *kratky*.

Dr. K. Beckmann, Aŭstrio.

(Laŭ la materialo de Radio Vieno)

EVENTOJ, esperanto nyelvű információs lap.
Nyt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.

A kiadó és a szerkesztőség címe:
H-1675 Budapest, pf. 87. Tel.: 1288258.

Megjelenik kéthetente. Kézbesíti a HELIR.

Készült az M & M nyomdában:

H-1161 Budapest, Bercsényi u. 10.

EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.

Eldonas Kultura Esperanto-Asocio

kaj LINGVO-Studio, Budapest.

Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.

La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondacas pri la anonc-enhavo.



La artikolo de Bernard Golden pri la slavismo je la *nomo* de tre amuzis min. Dankon - onidire rido utilas por la sano. Ne temas pri la formo mem. Estas al mi tute egale, ĉu iu diras *Universitato Adam Mickiewicz* (laŭdinda koncizeco), *Universitato je la nomo de Adam Mickiewicz* aŭ aliel, ekzemple *laŭ la nomo de, nome de, honore al...* Kial tamen la aŭtoro volas konvinki min, ke la slavdevena formo estas malĝusta, ĉar angle oni esprimas la samon alimaniere? Ĉu tial, ke esperanto estas internacia lingvo?

P.S.: Pole oni deklinacias ankaŭ la antaŭnomo, do necesas diri *Uniwersytet imienia Adama Mickiewicza*.

Wojciech Usakiewicz, Polio.

Estimataj, mi reagis al la enhavo de nro. 6. Rilate kompletan vojaĝkalendaron:

Mi opinias ĝin NE necesa, kiel la tuto. Tiaspecajn kalendarojn ni povas legi en Heroldo aŭ Esperanto-revuo de UEA, pli gravas, ke en la rubriko *Aranĝoj* aperu sufiĉe frue aktualaj informoj. Interalie ankaŭ por tiu celo ni bezonas/is pli ofte aperantan revuon, krom tio aperantaj tie informoj estas multe pli ampleksaj ol en kalendaroj. Laŭ mi la informo por esti bona devas esti plena.

Rilate la reagon de "Kruco".

La slogano *esperanto dua lingvo por ĉiuj* estas laŭ mia opinio nur ideala celo (ankaŭ de Zamenhof mem) al kiu esperantistoj strebu. Eble iam ĝi eĉ fariĝos realo, se ĝis tiam ni sukcesos konservi la unuecon de la lingvo.

Legante kaj observante multajn *ne necesajn* plibonigojn, mi timas, ke ni pli frue detruos la lingvon ol ĝi sukcesos fariĝi *dua por ĉiuj*.

Tamen la proponita ideo, peri, ne krei informojn sugestita de Kruco (kvankam ne nova) estas sekvinda, ĉar ni ankoraŭ *tro ofte* restas nur en t.n. "propra saŭco".

Tamen ĉe la fino de la reago mi ne konsentas kun la formo de demando: *kiel* vi opinias? devus esti: *kion* vi opinias? Ankoraŭ unu pruvo, ke ni ĝenerale ne bone uzas Ki-demandojn, kiuj ja estas ŝlosiloj al la e-gramatiko (kiel diris A. Cseh).

Rilate rubrikon *Lingvo*.

Tre aktuala temo (pro ofta eraruzo).

Mi ĝojas kune kun vi, ke *EVENTOJ* jam atingas 37 landojn.

Se temas pri eraroj mia opinio estas: *nur tiu ne eraras, kiu nenion faras*, do evitu ilin, sed ne ĉagreniĝu.

Tiom da reagoj de via fidela legantino:

Mila v.d. Horst-Kolinska, Nederlando.

Fakte, la ideo realigi tian revuon estas bona. Vi pravus: ne ĉiuj esperantistoj havas eblon (monon, tempon, energion) ĉiujare viziti 5-6 diversajn aranĝojn. Pro tio la revuo *EVENTOJ* devas aperi!

Do, mi elkore salutas vian ideon.

Trifoi Mihai, Rumanio.

Responde al demando de Mila kaj Gerardo van der Horst. Certe ne indas publikigi du tute similajn revuojn. Do, ni ne bezonas duan Literaturan Foiiron. Tamen la projekto revivigi Nordan Prismon ekis ĝuste pro tio, ke kelkaj personoj sentis, ke Literatura Foiro ne donas ion al ili kaj ke estus bezonata pli popola literatura-kultura revuo.

La venontaj jaroj montros ĉu Norda Prismo ricevos sufiĉan abonantaron por daŭre aperi. Espereble, kaj esperante ĝi ne havas malbonan efikon al la abonantkvanto de Literatura Foiro. Mi kredas, ke troviĝas loko ankaŭ por konkuranto, ne pro aroganteco, sed pro diverseco kaj elekto en esperanta gazetaro. Tio utilos kaj al la gazetoj (pro neceso plibonigi en konkuro), legantoj (ebleko elekti) kaj al la verkistoj (alternativa publikigo-kanaŭlo). Se vi volas elekti, unu ne sufiĉas.

Jukka Pietiläinen

redaktoro de Norda Prismo.

Estimata *EVENTOJ!*

Kiel abonanto kaj memvola kunlaboranto de *Eventoj*, surprize mi legis sur la titolo-paĝo de la 6a numero, ke la leteroj senditaj al HEA "ne alvenas al ni!". Certe la redaktoro miksis HEA kun iu alia organizaĵo, ja ĝuste en la sama numero aperis ne nur unu artikolo, kiuj estis adresitaj al HEA. Ni certigas vin, ke ankaŭ en la estonteco ĉiujn leterojn kiuj estos adresitaj al vi, ni transdonos al vi.

Oficisto de HEA

Iom da aldono al la demandoj en *EVENTOJ* nro. 3.:

La genealogia servo de mormonoj provizas siajn mikrofilmojn ankaŭ por nemembroj. Mia patro (ne membro de iu ajn eklezio), kiu konas nur la finnan, mendis mikrofilmojn pri Finnlando el la servo. Li pagis malgrandan sumon per dolara ĉeko kaj plenigis mendilon helpe de finlingva informilo. Post kelkaj semajnoj la mikrofilmoj alvenis kaj mia patro povis pruntepreni mikrofilman legilon el firmao, kiu ĝin ne bezonas kaj ne plu devis iri al regiona arkivo, kie troviĝas nur mikrofilmoj de nia regiono, sed ne de tuta Finnlando. Li esploras informojn pri siaj prapatroj hodie. Pri aliaj detaloj mi ne scias.

Jukka Pietiläinen, Finnlando.

KCE

La feriejo GASTEJO EDMOND PRIVAT de Kultura Centro Esperantista (Chemin des Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds) estas dum la tuta jaro ideala hejmo por studemaj kaj promenemaj esperantistoj. Petu la informilon!

Anoncetoj

“Buso de esperantistoj serĉas neluksajn tranoktejojn (gimnastikejo, tendumejo, paroĥio) kaj kontaktojn kun lokaj esperantistoj inter 8 kaj 23 de aŭgusto laŭ la sekva vojlinio: München, Augsburg, Strasbourg, Luxembourg, Paris, London, Stonehenge, Oxford, Cambridge, Boulogne sur Mer, Gent, Bruxelles, Eindhoven, Amsterdam, Aachen, Bonn, Nürnberg, Regensburg, Passau. Helpu ĉimaniere propagandon de esperanto.

S-ro Jozefo Baksa,

Pálóczi u. 7. H-8900 Zalaegerszeg, Hungario.

Ŝak-turniro

A.I.Ŝ.E. - Asocio Itala Ŝakludo Eterodoksa celante disvastigi esperanton inter ŝakludistoj kaj tabul-ludistoj organizas internaciajn turnirojn pri ne ortodoksaj korespondaj ŝakludoj (Progresivaj, Marsejlaj, Triplet, Mutacia, ktp.).

Ni alvokas geesperantistojn, kiuj deziras ricevi pliajn informojn kontakti peranton por Esperantio:

Marco Picasso

via de Gasperi 7, I-20057 Vedano a.L. (MI), Italio.

aŭ rekte A.I.Ŝ.E. - A. Castelli, I-62010 Villa Potenza (MC), Italio.

La germana urbo “Brauntels” fariĝis la ĝemelurbo de la hungara urbo “Kiskunfélegyháza”. Ĉu estas esperantist(in)o en tiu urbo de Germanio, kiu kunlaborus kun mi por “enŝteli” esperanton en la ĝemelurbajn kontaktojn?

Bajáki Imre,

H-6100 Kiskunfélegyháza, Dr. Holló L. u. 61. Hungario



Praktika prezento de naturkuracado en IJS!

S-ino Judit Nehéz, kunlaboranto de Altermed Klr. akceptis la inviton fari prelegon pri naturkuracado, pri alternativaj kuracmetodoj dum IJS en Esztergom. Post la prelego oni faros ankaŭ praktikan prezentadon!

(IJS = Internacia Junulara Semajno, 03.-09. en aŭgusto, u. Esztergom, Hungario.)

Alvoko

Stipendio Ivo Lapenna

Memore al prof. Ivo Lapenna (1909-1987) fondaĵo Lapenna subvencias disertaciojn je universitata nivelo kiuj temas pri esperantologio kaj/aŭ pri esperanto en rilato kun interlingvistiko kaj estas ellaboritaj en la spirito de Zamenhof kaj de Lapenna.

Detalan regularon petu de la sekretario de la fondaĵo:

Peter Zacho,

Nëregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio.

Meteorologia alvoko

La Kooperativo de Literatura Foiro intencas eldoni universalan kalendaron kun malnovaj populaj rimajoj pri la vetero. Mi klopodas kolekti tiajn *veter-rimajojn* el diversaj lingvoj kaj landoj. Doktoro Marjorie Boulton tradukis por mi nombron da anglaj rimajoj. Ŝi opinias mian projekton interesa kaj kulture valorra. Lili Giloteaux, el Francio, kaj mi esperantigis grandan kolekton el la nederlanda, franca kaj germana lingvoj. Mi ŝatus havi proprajn veterrimarkojn ankaŭ el via lando. Ni ne bezonas esprimojn, kiuj enhavas veterrilatajn vortojn, sed nenion diras pri la vetero, ekz: *Neĝo kaŝas nur ĝis printempo, Post vetero malbela lumas suno plej bela, k.s.*

Ĉu vi bonvolos provizi nin per tiaj rimajoj? Sufiĉas sendi prozajn tradukojn. Mi mem rimigos. Kostojn mi pagos. Honorarion mi bedaŭrinde ne povas doni. Mi estos tre danka, se vi iel helpos min.

Kelkaj ekzemploj:

- nederlanda:* En januaro suno pomoj en aŭtuno.
franca: se marto logas per sunhelo ne malutilas la mantelo.
germana: Ju pli frosta januaro des pli bona por la jaro.
angla: Herbo verda dum januaro malpli kreskos dum la tuta jaro.
hungara: Maja pluvo oron valoras.

L.C. Deij,

Sandelingeweg 14, NL-2988 BT Ridderkerk, Nederlando.

Kunvojaĝanto serĉata!

Se vi ne volas veturi sola al iu esperanto-aranĝo, vi povas serĉi kunvojaĝantojn. Se vi havas libera(j)n loko(j)n en via aŭtomobilo, vi povas dividi inter si ankaŭ la benzin-kostojn! Ankaŭ en trajno estas pli agrable veturi en kompanio.

Do, se vi serĉas kunvojaĝanton, anoncu ĝin en tiu ĉi rubriko. (Loko kaj dato de via starto, celo, itinero kaj via adreso).

Korespondi deziras

9 jara knabino, Julie Servain. Les Chantepies, F-49650 Brain sur Allonnes, Francio.

13 jara knabino, Nathalie Godefroy. “Les Cormiers”, F-49490 Dénezé /S Le Lude, Francio.

33-jara fraŭlo serĉas leteramikojn, junulinojn 25-30 j. Mi interesiĝas pri vojaĝoj, kutimoj, historio precipe antikva kaj ĉiutaga vivo. Mi ŝatas legi interesajn librojn, aŭdi bonan muzikon kaj migri. Mi kolektas bildkartojn el la tuta mondo.

Adam Seroczynski

PL-59-220 Legnica, Str. Hutników 11/5, Polio.

Katalin Andor, lernantino (15 jara). H-2151 Fót, Lenin köz 4, Hungario. Interesiĝas pri muziko, desegnado, libroj, matematiko. Volas korespondi ĉefe el Britio kaj Usono.

Péter Böhmer, lernanto (17 jara). H-2120 Dunakeszi, Barátság u. 37, Hungario. Interesiĝas pri ĉio. Volas korespondi ĉefe el Britio.

Eugeniusz Piasecki deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj kaj poŝtmarkoj. Ul. J. Matejki 2, PL-67-400 Wschowa, Polio.

Maria Maraloiu, 29 j., medicina teknikisto. Str. Tribunei 15, RO-2400 Sibiu, Rumanio.

Géza Lázár, 53 j., inĝeniero. Str. A. Muresanu 37, RO-2400 Sibiu, Rumanio.

Mi estas 18-jara lernantino, fraŭlino, interesiĝas pri turismo, amika korespondado, kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn. Vigilija Petrauskaitė, Birzai, 235280, Pilies-9, Litovio.

29 jara inĝenierino L. Altanchimeg; 29 jara oficistino S. Dagmidmaa; 18 jara junulo D. Enbaatar; 18 jara laboristino C. Dorghlham; 16 jara lernantino S. Erdenceceg; 19 jara junulino Ch. Ojunbileg. P.O. 20-B/461, Ulanbatro, Mongolio.

Mi aĝas 26 jaroj, mi estas arbora teknikisto. Mi ŝatas sporton, naturon vojaĝojn, legi librojn kaj aŭskulti belajn muzikojn. Alvaro Raul Valdes; La Caoba, Manacas, Villa Clara, Cuba 54510.

Mi havas 28 jarojn. Mi laboras en lernejo, kiel instruistino de biologio. Mi lernas esperanton unu jaron. Mi ŝatas la naturon, la vojaĝojn. Kovriškina Jelena; Davidovo 2 - mikrorajono 13A-26, Moskva regiono - 142641, Rusio.

Mi volus korespondi pri edukado, turismo, teatro, joko. Mi laboras kiel instruistino en mezlernejo kaj instruas teknikajn objektojn. Mi havas 44 jarojn. Hanryka Maria Szumigaj; Str. Rajdowa 20 L 85, PL-92-003 Lodz, Polio.

13-jara knabo, Rafal CHIMIAK, ul. Korczaka 18, PL-64-920 Pila, Pollando, kolektas poŝtkartojn pri urboj.

23-jara fraŭlino Alicja MATUSZEWSKA, ul. Harcerska 8/21, PL-43-300 Bielsko-Biala, Pollando, pri muziko, esperanto, libroj, vojaĝoj.

Aboneblo por la dua duonjaro!

Karaj legantoj,

ŝajne la decido startigi *EVENTOJ*-n ne ĵar-komence (kion kaŭzis eksteraj teknikaj cirkonstancoj) - havas siajn postsekvojn...

Laŭ la alvenintaj leteroj evidentas, ke la gazeton legas ne nur la abonintoj, sed ankaŭ iliaj konatoj, samklubanoj, ja ni ricevis multajn petojn kaj proponojn enkonduki aboneblon ankaŭ por la dua duonjaro "almenaŭ en la starta ĵaro".

Estis ja multaj, kiuj ne kredis reala la dusemajnan aperritmon, kaj decidis iom atendi por vidi la rezulton. Por ne elspezi por la malnovaj numeroj, la abono por nur la dua duonjaro ebligas al ili estonte (sed ankoraŭ ĉi-jare) regule ricevi kaj legi la gazeton.

Do, finpensinte la aferon, ni decidis enkonduki tiun abontarifon, kiu validas inter la 1-a de julio kaj 31-a de decembro 1992. Abonkotojn por la unuopaj landoj vi trovas en la apuda tabelo. Ni tre ĝojus, se pri tiu ebleco vi informus ankaŭ viajn konatojn, amikojn.

Esperanta sonkasedo senpage!

Oni (=ni) faras la gazeton, por ke la esperantistoj legu ĝin. Konforme al nia originala celo, ni klopodas aperigi artikolojn, kiuj helpas al movade-nespertuloj orientiĝi en la eventoj de nia komunumo.

Por kreskigi la abonantaron plej efike povas helpi ĝuste la ĝisnunaj legantoj, kiuj plej bone konas la karakteron kaj fidindecon de nia gazeto. Do, se vi kolektos 5 novajn abonantojn al la dua duonjaro de 1992, por simbolo danki vian helpon ni proponas al Vi la muzikan sonkasedon de J. Dinnyés: *AL VENKO!*, kiu enhavas 16 esperantajn kantojn, inter ili la melodigitajn verkojn de tiel famaj aŭtoroj kiel J. Baghy, R. Schwartz aŭ Zamenhof!

Por ricevi la kasedon vi simple kolektu la abonilojn, kune (!) sendu ĝin al ni, kaj respektive la abonkotojn sendu kune al via kotizperanto!

Se vi estas kontenta pri la ĝisnunaj numeroj, ni dankas vian ĉi-rilatan helpon.

Kun samideanaj salutoj

Szilvási László



Kiel aboni *EVENTOJ*-n?

1. Plenigu la abonilon, aŭ skribu leteron kun la sama enhavo, kaj sendu ĝin al la redakcio (LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, pk. 87. Hungario).

2. Pagu la abonkotojn al vialanda peranto listigitaj sube en la koncerna nacia valuto kaj sumo. (Se estas indikita dolaro anstataŭ vialanda valuto, tio signifas ke vi devas pagi la aktualan ekvivalenton de tiu sumo en via valuto).

3. La revuon vi ricevos rekte el Hungario perpoŝte.

Kiel pagi?

- Sendu la kotizon al vialanda kotizperanto (perpoŝte aŭ poŝtĝirkonto) - en nacia valuto.

- Sendu la monon al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, kodo ELLS-S, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

- Sendu la monon rekte al la redakcio per simpla internacia poŝtmandato, aŭ perbanke al Banko OTP, Budapest XVIII, Konto 218-98189/542-030808-7. Vi povas sendi ankaŭ euroĉekon. La valuto sur ĝi devas esti en ajna tipo de konvertebla valuto. Sur la dorsa flanko nepre skribu la numeron de via bankkonto!

- En fina kazo - je via risiko - sendu monbiletojn (en konvertebla valuto inkluzive forintojn) en fermita koverto al la redakcio.

Landaj kotizperantoj

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg (pĉk. 7.127.144).

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).

Brazilio: Brazila Esperanto Ligo, Carlos Maria, Cx. Postal 03625, Brasilia-DF, 70084.

Britio: Paul Hewitt, 26 Higfield Rd, North Thoresby, Grimsby, S. Humbs, DN36 5RT.

Ĉeĥoslovakio: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Vladimír Dvorak, Jilska 10, CS-110 00 Praha-1.

Danio: Eckhard Bick, Rugbjergvej 98, DK-8260 Viby-J.

Francio: UFE, 4. bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk. 855-35 D Paris).

Germanio: Monda Merkato, Alfred Schubert, Pf. 1539, DW-8120 Weilheim, (konto 365255-806, postgiroamt München, BLZ 700 100 80).

Hungario: LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, pk. 87.

Hispanio: Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila 127, p.7, 2º izda, E-39007 Santander (Cantabria) Bankkonto ĉe Caja Postal n-ro 03548531 (O.P.)

Israelo: Aviv Faklieru, Pk. 8383, IL-61083

Tel-Aviv, (konto 403679, Bank Mizrahi, Faklieru Esperanto).

Italio: Itala Esperanto-Federacio, villa Villaresi 38, I-20143 Milano (pĉk. 37312204).

Korea Respubliko: Seula Esperanto-Kulturcentro, Lee Jung-kee, 100-630 C.P.O. Box 3047, Seoul.

Kroatio: Kroatia Esperantista Unuiĝo, Marija Belošević, Trg burze 2, 41000 Zagreb.

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo, poŝtĝirokonto 0809 5100318.

Polio: P.W.H. NEPO, skrytka 105, Maciej Wnuk, ul. Broniewskiego 77. m. 137, PL-01865 Warszawa.

Portugaliao: Libroservo de Portugala Esperanto-Asocio, Antonio Martinus, Rua rd. Joao Conto 6, R/C-A, P-1500 Lisboa.

Sud-Afriko: Colin Beckford, P.O. Box 1227, Cape Town, 8000.

Svedio: Sveda Esperanto Federacio, SEF, c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen.

Venezuelo: Prof. J. E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.

● Esperantistoj el eksa Sovetunio, Rumanio kaj Bulgario ĉi-jare ankoraŭ povas aboni la gazeton kontraŭ 10 dolaroj.

Kotizoj por 01.07.-31.12.1992.

		Eventoj surface	Eventoj aere
Aŭstrio	ATS	177	+30
Belgio	BEF	550	+75
Brazilio	USD	8	+2
Britio	GBP	9	+2
Ĉeĥoslovakio	KCS	170	—
Danio	DKK	100	+20
Francio	FRF	90	+15
Germanio	DEM	27	—
Hungario	HUF	470	—
Hispanio	ESP	1800	+300
Israelo	USD	9	+2
Italio	ITL	18000	3000
Korea Resp.	USD	8	+2
Kroatio	USD	9	—
Norvegio	NOK	100	+20
Polio	PLZ	90000	+15000
Portugaliao	PTE	2200	+300
Sud-Afriko	ZAR	40	+10
Svedio	SEK	100	+13
Svislando	CHF	24	+3
Venezuelo	USD	8	+2
ĉiuj aliaj landoj	NLG	30	+4

sendu al: *EVENTOJ*, H-1675 Budapest, pk. 87. Hungario

ABONILO

Jes, mi abonas la gazeton *EVENTOJ* por la dua duonjaro de 1992!

Nomo de la abonanto:

Preciza poŝta adreso:

..... poŝta kodo:

La abonprezon de (sumo) mi pagis al:

Dato: Subskribo:

Aboneblo por la dua duonjaro!

Karaj legantoj,

ŝajne la decido startigi EVENTOJ-n ne jarkomence (kion kaŭzis eksteraj teknikaj cirkonstancoj) - havas siajn postsekvojn...

Laŭ la alvenintaj leteroj evidentas, ke la gazeton legas ne nur la abonintoj, sed ankaŭ iliaj konatoj, samklubanoj, ja ni ricevis multajn petojn kaj proponojn enkonduki aboneblon ankaŭ por la dua duonjaro "almenaŭ en la starta jaro".

Estis ja multaj, kiuj ne kredis reala la dusemajnan apertimon, kaj decidis iom atendi por vidi la rezulton. Por ne elspezi por la malnovaj numeroj, la abono por nur la dua duonjaro ebligas al ili estonte (sed ankoraŭ ĉi-jare) regule ricevi kaj legi la gazeton.

Do, finpensinte la aferon, ni decidis enkonduki tiun abontarifon, kiu validas inter la 1-a de julio kaj 31-a de decembro 1992. Abonkotizojn por la unuopaj landoj vi trovas en la apuda tabelo. Ni tre ĝojus, se pri tiu ebleco vi informus ankaŭ viajn konatojn, amikojn.

Esperanta sonkasedo senpage!

Oni (=ni) faras la gazeton, por ke la esperantistoj legu ĝin. Konforme al nia originala celo, ni klopodas aperigi artikolojn, kiuj helpas al movade-nespertuloj orientiĝi en la eventoj de nia komunumo.

Por kreskigi la abonantaron plej efike povas helpi ĝuste la ĝisnunaj legantoj, kiuj plej bone konas la karakteron kaj fidindecon de nia gazeto. Do, se vi kolektos 5 novajn abonantojn al la dua duonjaro de 1992, por simbole danki vian helpon ni proponas al Vi la muzikan sonkasedon de J. Dinnyés: AL VENKO!, kiu enhavas 16 esperantajn kantojn, inter ili la melodiigitajn verkojn de tiel famaj aŭtoroj kiel J. Baghy, R. Schwartzaŭt Zamenhof!

Por ricevi la kasedon vi simple kolektu la abonilojn, kune (!) sendu ĝin al ni, kaj respektive la abonkotizojn sendu kaŭne al via kotizperanto!

Se vi estas kontenta pri la ĝisnunaj numeroj, ni dankas vian ĉi-rilatan helpon.

Kun samideanaj salutoj

Szilvási László



Kiel aboni EVENTOJ-n?

1. Plenigu la abonilon, aŭ skribu leteron kun la sama enhavo, kaj sendu ĝin al la redakcio (LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, pk. 87. Hungario).

2. Pagu la abonkotizon al vialanda peranto listigitaj sube en la koncerna nacia valuto kaj sumo. (Se estas indikita dolaro anstataŭ vialanda valuto, tio signifas ke vi devas pagi la aktualan ekvivalenton de tiu sumo en viala valuto).

3. La revuon vi ricevos rekte el Hungario perpoŝte.

Kiel pagi?

- Sendu la kotizon al vialanda kotizperanto (perpoŝte aŭ poŝtĝirkonto) - en nacia valuto.

- Sendu la monon al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, kodo ELLS-S, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

- Sendu la monon rekte al la redakcio per simpla internacia poŝtmandato, aŭ perbanke al Banko OTP, Budapest XVIII, Konto 218-98189/542-030808-7. Vi povas sendi ankaŭ euroĉekon. La valuto sur ĝi devas esti en ajna tipo de konvertebla valuto. Sur la dorsa flanko nepre skribu la numeron de via bankkarto!

- En fina kazo - je via risiko - sendu monbiletojn (en konvertebla valuto inkluzive forintojn) en fermita koverto al la redakcio.

Landaj kotizperantoj

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg (pĉk. 7.127.144).

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen (pĝk. 000-0265338-43).

Brazilio: Brazila Esperanto Ligo, Carlos Maria, Cx. Postal 03625, Brasilia-DF, 70084.

Britio: Paul Hewitt, 26 Higfield Rd, North Thoresby, Grimsby, S. Humbs, DN36 5RT.

Ĉeĥoslovakio: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Vladimír Dvorak, Jilska 10, CS-110 00 Praha-1.

Danio: Eckhard Bick, Rugbjergvej 98, DK-8260 Viby-J.

Francio: UFE, 4. bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk. 855-35 D Paris).

Germanio: Monda Merkato, Alfred Schubert, Pf. 1539, DW-8120 Weilheim, (konto 365255-806, postgiroamt München, BLZ 700 100 80).

Hungario: LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, pk. 87.

Hispanio: Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila 127, p.7, 2º izda, E-39007 Santander (Cantabria) Bankkonto ĉe Caja Postal n-ro 03548531 (O.P.)

Israelo: Aviv Faklieru, Pk. 8383, IL-61083

Tel-Aviv, (konto 403679, Bank Mizrahi, Faklieru Esperanto).

Italio: Itala Esperanto-Federacio, villa Villaresi 38, I-20143 Milano (pĉk. 37312204).

Korea Respubliko: Seula Esperanto-Kulturcentro, Lee Jung-kee, 100-630 C.P.O. Box 3047, Seoul.

Kroatio: Kroatia Esperantista Unuiĝo, Marija Beloŝeviĉ, Trg burze 2, 41000 Zagreb.

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo, poŝtĝirokonto 0809 5100318.

Polio: P.W.H. NEPO, skrytka 105, Maciej Wnuk, ul. Broniewskiego 77. m. 137, PL-01865 Warszawa.

Portugalio: Libroservo de Portugala Esperanto-Asocio, Antonio Martinus, Rua rd. Joao Conto 6, R/C-A, P-1500 Lisboa.

Sud-Afriko: Colin Beckford, P.O. Box 1227, Cape Town, 8000.

Svedio: Sveda Esperanto Federacio, SEF, c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen.

Venezuelo: Prof. J. E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.

• Esperantistoj el eksa Sovetunio, Rumanio kaj Bulgario ĉi-jare ankoraŭ povas aboni la gazeton kontraŭ 10 dolaroj.

Kotizoj por 01.07.-31.12.1992.

		Eventoj surface	Eventoj aere
Aŭstrio	ATS	177	+30
Belgio	BEF	550	+75
Brazilio	USD	8	+2
Britio	GBP	9	+2
Ĉeĥoslovakio	KCS	170	—
Danio	DKK	100	+20
Francio	FRF	90	+15
Germanio	DEM	27	—
Hungario	HUF	470	—
Hispanio	ESP	1800	+300
Israelo	USD	9	+2
Italio	ITL	18000	3000
Korea Resp.	USD	8	+2
Kroatio	USD	9	—
Norvegio	NOK	100	+20
Polio	PLZ	90000	+15000
Portugalio	PTE	2200	+300
Sud-Afriko	ZAR	40	+10
Svedio	SEK	100	+13
Svislando	CHF	24	+3
Venezuelo	USD	8	+2
ĉiuj aliaj landoj	NLG	30	+4

sendu al: EVENTOJ, H-1675 Budapest, pk. 87. Hungario

ABONILO

Jes, mi abonas la gazeton EVENTOJ por la dua duonjaro de 1992!

Nomo de la abonanto:

Preciza poŝta adreso:

..... poŝta kodo:

La abonprezon de (sumo) mi pagis al:

Dato: Subskribo:

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ILEI - cele al la estonto

Akceli la oficialan enkondukon de esperanto en lernejojn tra la mondo - jen unufaze la ĉefa celo de ILEI, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

Sekve ĝi okupiĝas pri instruista trejnado kaj priservado; ĝi kontaktas edukajn ministeriojn kaj instancojn kaj klopodas porti spiriton de internacieco en la esperantaj klasĉambroj - emfazante respekton kaj toleremon inter la popoloj kaj kulturoj. Kiel specife ILEI laboras por plenumi siajn celojn, vi povas legi en la Trijara Laborplano (1992-94).

Kiujn servojn

ILEI proponas al vi?

... En unu vorto: internacieco! ... En pluraj vortoj:

- vi povas partopreni nian ĉiujaran unusemajnan konferencon, kie vi renkontos kolegojn el plej diversaj landoj kaj povos kompari instru-spertojn. Vi ĝuos fakajn prelegojn, forumojn, model-lecionojn, kune kun distra kaj kultura programo.
- vi povas sperti instruadon pere de esperanto en la praktiko, kadre de la ILEI-gimnazio, kiu okazas paralele kun la konferenco. Se vi instruis esperanton al junuloj inter 13-kaj 16-jaraj, ili eventuale povus mem partopreni la someran kurson. Instruistoj povas kandidatiĝi prezenti lecionojn.
- *vi ricevos, kiel membro, la organon de ILEI, Internacia Pedagogia Revuo 4-foje jare*, plena je fakaj artikoloj pri lingvo-instruado, recenzoj de lernolibroj ks., kontaktadreso de e-klasoj kaj ĉiaj komunikoj pri la Ligo. (La revuo IPR ne estas aparte abonebla, ĝin ricevas nur la membroj!)
- vi povas aboni la junularan revuon *Juna Amiko* eldonata de ILEI por junaj lernejoj tra la tuta mondo. Ĝi donas facilan, aktivigan lego-materialon, kune kun dialogoj, rakontoj, enigmoj, kvizoj, kantoj, poemoj kaj multo pli, verkitaj de junuloj kaj instruistoj en ĉiuj mondanguloj.
- vi havos je dispono aliajn lernolibrojn kaj pedagogiajn verkojn eldonitaj aŭ kuneldonitaj de ILEI.
- vi povas partopreni la renomajn Internaciajn Metodikajn Seminariojn aŭspiciataj de ILEI, kaj aliajn aranĝojn de la sekcioj. Vi ricevos pere de ILEI informojn pri ĉiuspecaj kursoj (lingvaj kaj pedagogiaj) ofertataj en la plej diversaj E-centroj tra la mondo.
- vi povas pruvi vian lingvan kapablon pere de la tri-ŝtupa ekzamena sistemo funkciigata de ILEI en la nomo de ĝi kaj UEA, kaj rekonigi vian instrukapablon per partopreno de pedagogiaj kursoj organizitaj aŭ aŭspiciataj de ILEI, eventuale kun atesta ekzameno.
- vi povas akcepti vizitantan instruiston en via lernejo, por porti veran internaciecon al viaj lernantoj. Aŭ vi kiel instruisto povos vojaĝi internacie donante lecionojn en e-klasoj. ILEI ligo por taŭge kvalifikitaj instruistoj la necesajn kontaktojn.

Kiel vi povas servi al ILEI?

... Unuvorte: membriĝi. ... Duvorte: membriĝi kolegojn! ... Pluvorte:

- Mendi niajn eldonaĵojn (revuojn, librojn, studojn, ktp).
- Laboru aktive en niaj komisionoj aŭ sekcioj.
- Viaj donacoj al la Koleg-helpa kaso estas tre bonvenaj, ĉar kiel neniam antaŭe estas granda deziro inter instruistoj en landoj, kie transpago de kotizo estas malhelpanta. Ni tamen ne volas rifuzi tiujn kolegojn, ĉar tio negus nian internaciecon.
- ILEI starigis Fondaĵon Szerdahelyi, honore al la memoro de la elstara hungara pedagogo, kiu ankaŭ prezidis la Ligon. Donaco al ĝi konstruos por ni pli firman fundamenton por entrepreni bezonatajn projektojn. Donacante, vi povas indiki al kiu kampo vi deziras kontribui.



ILEI nun havas ĉirkaŭ 800 membrojn. Milmembra ILEI estus pli forta kaj laborkapabla! La Ligo ekmez-aĝas - baldaŭ ĝi festos la 45an datrevenon! Sed ĝi volas resti juneca kaj aktuala - strebante altigi la kvaliton de esperanto-instruado en la mondo kaj vastigi la aplikeblojn. Por fari tion realisme kaj servi al la instruistoj ĝi bezonas pli da membroj kaj rimedoj - homaj kaj financaj.

Se vi mem instruas esperanton en lernejo aŭ klubo, aŭ okupiĝas pri iu ajn aspekto de la edukado - via loko estas nepre en ILEI!

Kiu rajtas esti membro?

Unuavice instruistoj aktive instruantaj esperanton kun iu grado de oficialeco. Sed same instruistoj posedantaj esperanton, dezirantaj internacian kontakton kun samprofesiaj kolegoj. Same instruistoj de ne-oficialaj klasoj aŭ kluboj, aŭ iu ajn, kiu interesiĝas aŭ okupiĝas pri lingvo-instruado aŭ internacieca edukado.

Sekcioj de ILEI agas en 31 landoj, kaj ni havas reprezentantojn en pliaj landoj. La nombro de landoj en la mondo abrupte kreskas, atendeble ankaŭ la nombro de niaj sekcioj! Se ekzistas sekcio por la teritorio, kie vi loĝas, aliĝante al ILEI, vi aŭtomate apartenos ankaŭ al ĝi.

Sekciestroj de la Ligo

Argentino: Herminia Kirkerup de Fernandez (s-ino); Calle Cerrito 1249, Barrio San Martín, RA-5000 Córdoba (Córdoba).
 Aŭstrio: Mag. Walter Klug; Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien.
 Belgio: Alex Humet; Van Campenhoutstr. 4, B-2600 Berchem.
 Brazilio: Elvira Fontes; Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 Sao Paulo SP.
 Britio: Arnold Pitt; Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD.
 Bulgario: Ivanka Spasova; j.k. Lenin bl. 20, vh. 3, BG-1124 Sofia.
 Ĉeĥio: Miroslav Malovec; Charkovska 7/10, CS-625 00 Brno.
 Ĉinio: Zhang Danchen; General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan.
 Estonio: Eve Otsa; Liivalaia 30-12, EST-200001 Tallinn.
 Finnlando: Synnöve Mynttinen; Keskussairaalankatu 5 M 133, SF-15850 Lahti.
 Francio: Edmond Ludwig; 26 Route de la Schlucht, F-68140 Münsterey.
 Germanio: Stefanie Tucker; Alatseestr. 14, DW-8900 Augsburg Till-Dietrich Dahlenburg; Feldstr. 13, DO-2722 Brühl.
 Hispanio: Manuel López Hernández; Poŝtkesto 832, E-41080 Sevilla.
 Hungario: Kovács Márta; Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest.
 Israelo: Murjan Josef; P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv.
 Italio: Catina Dazzini; C.P. 22, I-54100 Massa.
 Korea Resp.: So Jin Su; Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugail Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900.
 Nederlando: D. Luesken-Burger; Randerklippenweg 5, NL-8162 NC Epe.
 Nordameriko: Doroteo Holland-Kaup; 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono.
 Norvegio: Turnu vin al NEL; Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo 5.
 Polio: Turnu vin al E-Centro Bialystoko; ul. Piasta 52/21, PL-15-044 Bialystok.
 Portugalio: Alexandre Kasesa; Rua Actriz Palmira Bastos 10, 4'B, P-1900 Lisboa.
 Sanmarino: Marina Michelotti; Contrada del Collegio 51, RSM-43031 San Marino.
 Slovakio: Anton Zachariás; Sobotské nám. 6, CS-058 01 Poprad.
 Slovenio: Sonja Tavčar; Liminijanska 6, SLO-66320 Porotoroz.
 Sud-Afriko: Japie Spoelstra; Postbus 20185, Noordbrug 2522.
 Svedio: Bertil Andreasson; Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby.
 Svisio: Nicole Margot; Tour Grise 28, CH-1007 Lausanne.
 Venezuelo: Inĝ. Felix Garcia Blasquez; Apartado 75.090, YV-1070 A Caracas.
 Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila; B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre).

Krome ILEI havas reprezentantojn en Albanio, Bangladeŝo, Centrafrika Respubliko, Ĉilio, Hinda Unio, Irano, Kroatio, Niĝerio, Rumanio kaj Tanzanio. Ĝi havas komisionojn pri Didaktikaj ludoj, Ekzamenoj, Eŭropa Komunumo 92, Gazetara Servo, Lernaj Konkursoj, Statistikado, Statuto, Terminologio kaj Unuiĝintaj Nacioj (Jaro de la Familio 94).

Prezidanto de ILEI: Stefan MacGill, Esó u. 7, H-1034 Budapest, Hungario.

Kasisto de ILEI: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio.

UEA-kodo de ILEI: ilek.a.

ILEI deziras, ke post la tralego de ĉi tiu informilo vi konvinkiĝis, ke via loko estas ene de ILEI! Membrotizoj: Por loĝanto kun landa sekcio de ILEI: 80 SEK, - sen landa sekcio: 50 SEK. Por netranspagipovaj landoj ekzistas apartaj tarifoj. Skribu tuj al via landa sekcio! Ni kore bonvenigas vin!

juna amiko

Nia revuo eniras sian dekanan jaron sub la gvido de nova eldonisto

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

ilei INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

NUMERO 60
92/1